

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 5/2005 ★ ISSN 0032-2431



Aŭtunaj pripensoj

Falas folioj de arboj aŭtunaj
kaj surterigas frustrante pri io.
Similas ili al gracoj ĉielaj
al ni flugantaj kun beno de Dio.



Aŭtunaj arboj staras meditantaj,
kovritaj de la matena nebulo,
kaj de filandraj haroj ĉirkaŭitaj
ĵetas foliojn flavajn sen skrupulo.

Malsekajn branĉojn siajn etendante
trinkas la roson dum ĉiu mateno,
aŭtunajn kapojn klinas al la tero
kaj povriĝintaj dronas en ĉagreno.

La foliaro kovras ĉiujn kampojn,
envolvas parkojn, stratflankojn, vojojn...
kiel leteroj de homoj mortintaj
kaŭzas nun nian pripenson, malĝojon.

verkis: *Weronika Zarzycka*
tradukis en Esperanton: *Czesław Baranowski*



5
2005

Enhavtabelo:

-
- 3 La Esperanto-movado en Pollando
— ĉu ŝanco aŭ perdita tempo?
Kazimierz Leja
-
- 5 Henryk Sienkiewicz — la majstro de epiko
Lidia Ligęza
-
- 14 Ĉiuj miaj mortoj (parto dua)
Halina Poświatowska / Lidia Ligęza
-
- 16 La Pereintoj in Memoriam — recenzo
Leen Deij
-
- 17 50 jarojn sur la Zamenhofa vojo
esperantista biografio de Roman
Dobrzyński
-
- 21 La prepozicio SUPER en praktika uzado
Czesław Baranowski
-
- 23 Kiu kapablas interpreti?
Detlev Blanke
-
- 24 Plibonigu vian stilon
Rikardo Ŝulco
-
- 27 „Ni venkos ondegojn”
Stanisław Ŝmigieński
-
- 31 „Jen la foto”
Barbara el Nowy Sącz
-
- 32 Paŭlo kaj Gaŭlo
Aleksander Fredro / Leo Belmont
-
- Kovrilpaĝe:** „Aŭtunaj ripensoj”
*Weronika Zarzycka / Czesław
Baranowski.*
-

Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 5/2005 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

Redaktoro: Kazimierz LEJA
Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro.
TTT-paĝo: www.hejme.com.pl
Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl
Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

La redaktoro rezervas al si rajton mallongigi kaj redakti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:
UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6
EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

La Esperanto—movado en Pollando — ĉu ŝanco aŭ perdita tempo?

Multfoje mi aŭdis, ke Esperanto bone, aŭ malbone „fartas”. Homoj, eldirintaj tiajn opiniojn certe pensis ne pri la internacia lingvo mem, sed pri la komunumo esperantista, kiu uzadas Esperanton, aŭ ŝajnas uzadi ĝin.

Observante hodiaŭan esperantistan komunumon en Pollando oni povas ĝoji, ke ekzistas en ĝi samideanoj, por kiuj uzado de la lingvo ne estas afero nur amuza, helpanta okupiĝi pri escepte privataj aferoj, kiel interŝanĝo de poŝtmarkoj, bildkartoj, utiligado de internaciaj kontaktoj por trovi malplikostajn eblecojn vojaĝi tra la mondo...

Tiaspeca profito el kono de iu ajn fremda lingvo en si mem ne estas kompreneble riproĉinda. Lingvo ekzistas ja por uzi ĝin, por komunikiĝi kun aliaj personoj, iu ajn cele.

Tamen, pensante pri la Esperanto—movado oni ne povas forigi de antaŭ okuloj la celojn, kiujn L.L. Zamenhof ligis kun la internacia komunikilo. La „interna ideo” de Esperanto — la esenco de esperantista movado, neniam estis celita kiel nura aldonajo al hobiaj kaj vanaj babiladoj. Esenco de esperantismo, do, ne apogas sin sur la kono kaj uzado de la lingvo, sed celas alporti humanisman profiton kaj por la esperantistoj, kaj por la tuta socio, en kiu ili vivas.

Tial la komunumo zorgas pri la kono de siaj radikoj, historio, literaturo, arto, diskonigas Esperanton organizante kursojn, prelegojn, skribante artikolojn al nacilingvaj revuoj, gazetoj. Komunumo organizita planas ankaŭ sian disvolviĝon, komencante de klerigado de siaj membroj, ilia intelekta kresko, kaj sekve pli profesia, impeta agado, kies premo estas atingi starigitajn antaŭe celojn.

Mi ne parolas pri neatingebla vizio de pola esperantista movado. Mi ne estas revulo, havanta idealojn neniam plenumebajn. Estas inter ni multaj homoj, kiujn la nuna stato de nia movado ne kontentigas, kiuj volus kaj povus ŝanĝi la bildon de disigita, malforta, ne rekonata organizo, kies kvazaŭ ununura celo estas... daŭri.

Ŝancoj por efektiva agado estas ĉiam, kiam homoj havas celojn kaj volas ilin atingi. Niaj organizaĵoj devas esti profesie prizorgataj, por servi al ĉiu valora iniciato de aktivuloj pere de organiza kaj financa helpo, traktante ilin kiel komuna, grava afero.

Serioze pripensu multegajn eblecojn, kiujn ni perdas pro malaktiveco kaj stagnado. Neniam ni atingos celojn, kiujn ni eĉ ne konas kiel propran laborplanon. Anstataŭ babili, ni provu serioze ek trovi nian rolon en la movado. La tempo pasas...

Pola Esperantisto

Kun granda plezuro mi volas anonci, ke dum la pasintaj du monatoj kristaliĝis denove la redakcia komitato de *Pola Esperantisto*, al kiu venontjare apartenos (krom mi): Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligęza. Promesis konstante kunlabori junularo de *Varsovia Vento*, kiu intertempe decidis ĉesi la eldonadon de la *Tornado*. Sian konstantan lokon en la revuo pripensas ankaŭ Silezia Esperanto-Asocio. Kompreneble, ĝisnunaj konstantaj kunlaborantoj (Czesław Baranowski, Roman Dobrzyński, Danuta Kowalska) ĉiam povas kalkuli je la deca loko sur niaj paĝoj.

Al ĉiuj ĝisnunaj kontribuintoj mi elkore dankas. Mi dankas ankaŭ al tiuj, kiuj senpere kontaktis min (persone aŭ perletere), por montri mankojn, laŭdi aŭ kritiki la enhavon de PE, proponi ion novan. Ĉiujn sugestojn mi ĉiam profunde pripensas, kvankam ne ĉiam povas utiligi ilin...

Venontjare ni festos 100-jariĝon de la unua eldono de *Pola Esperantisto*. Por omaĝi tion ni planas eldoni kroman kajeron, dediĉitan escepte al tiu ĉi temo. Depende de la nombro de abonantoj kaj sponsoroj, la jubilea eldono povos esti senpaga aŭ krompaga, plenkolora aŭ nigra-blanka. Ĉio dependas denove de vi (ni aldonas pagilon por faciligi reabonon de la revuo). Ni esperas ricevi ĉiujn pagojn ĝis la fino de la kuranta jaro, por povi fari labor- kaj financan planojn.

Por novaj abonantoj: oni ne devas sendi apartan abonilon; se vi plenigos

ĉiujn necesajn rubrikojn pri via nomo, adreso (kun poŝta kodo!) en la pagilo. Eksterlandanoj: memoru pri la sciigo de via pago al UEA-konto!

Literatura Komitato

Antaŭ kelkaj monatoj Eldonejo *Hejme* kune kun Eldonejo *La Epoko* de Tomasz Chmielik faris kontrakton pri pli efika kunlaboro. Dum la ĵus finigintaj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES, Poznań) ekestis kaj kunsidis la Literatura Komitato, gvidata de Tomasz Chmielik, kies celo estas prilabori kaj prepari por eldono valorajn verkojn kaj tekstojn, originale verkitajn kaj tradukitajn en Esperanton.

Post preskaŭ prespreta *La Roma Triptiko* de Johano Paŭlo la Dua, la plej granda entrepreno, duone jam farita, estas preparo de trivoluma *Pola Antologio de poezio kaj prozo*. Ĝi devas plenumi la rolon de „pola ambasadoro” en la internacia Esperanto-komunumo, kaj celas atingi ankaŭ la hejmon de ĉiu serioza pola samideano. Krom tre „seriozaj” verkoj estas ankaŭ preparataj poŝformataj eroj de Esperanta literaturo, historiaj fontoj (ekz. Zamenhofaĵoj), kaj multaj aliaj.

Pri la taskoj, laboroj kaj personoj pli abunde ni informos en la decembra eldono de PE, kion ni promesis en Poznań.

Ankaŭ decembre ni malkovros la kondiĉojn de kunlaboro por sekvaj literaturistoj, komputilistoj, provlegantoj k.a., kies helpo en la laboroj estas tre bonvena. ♣

Migre tra la parko de pola literaturo...

...kun Lidia Ligęza

Henryk Sienkiewicz – la majstro de epiko

La 5an de majo 1846, en Wola Okrzejska sub Łuków (en la Lublina diskrikto) naskiĝis Henryk Adam Aleksander Pius Sienkiewicz, filo de Józef kaj Stefania Cieciszowska.

En la jaro 1866 li finis gimnazion en Varsovio post kelkfoja ŝanĝado de la lernejoj. Ĝis la jaro 1871 li studis laŭvice juron, medicinon kaj filologion ĉe varsovia Ĉefa Lernejo, sed studadon li ne finis.

Julie 1874 Henryk solene fianĉiĝis kun Maria Keller, filino de la altranga poŝtista oficisto. En la sama jaro la verkisto unuan fojon vojaĝas eksterlanden — al Bruselo kaj Parizo, pri kio abunde li raportas en leteroj al la fianĉino. Dum la malfrua aŭtuno patro de Maria perletere nuligas la fianĉiĝon.

Komence de la jaro 1876 Sienkiewicz kiel korespondanto de *La Pola Gazeto* forvojaĝas al Usono. Post la supraĵa ekkono de la lando li aranĝas en ĉirkaŭaĵo de Los Angeles, en Anaheim, domon por familio kaj geamikoj de la fama aktorino Helena Modrzejewska. La tuta societo anstataŭ agi

konkorde kun siaj eblecoj komencis tute utopie version de gefarmistoj. Ili proponis agrokultivi oranĝajn arbetojn, kio finiĝis per bankroto. Finfine Helena Modrzejewska komencis agi kiel aktorino kaj gajnis grandan famon.



Henryk Sienkiewicz forlasis Anaheim. Li revenas al Eŭropo en la jaro 1878, vizitas Parizon kaj Normandion, prelegas en Lvovo, Szczawница, Krynica, ekskursas al la orienta Pollando kaj al Italio. En Venecio li ekonas fratinojn Szetkiewicz, filinojn de iam riĉa civitano de Litovio, punita pro partopreno en la

kontraŭrusa ribelo, en 1863 jaro.

En la jaro 1881 Sienkiewicz edziĝas kun Marta Szetkiewicz, kiu naskas al li du geinfanojn: Henryk Józef kaj Jadwiga. En 1885, post provoj kuraĉi sin en Francio, Bavario kaj Italio, Maria mortas pro ftizo. En la sama jaro la verkisto unuan fojon kuracas sin en Kaltenleutgeben apud Vieno, kien li multfoje revenadis, ankaŭ por verki. Li vojaĝas preskaŭ senĉese kaj malgraŭ tio li scipovas efike labori.

Nur dum tri jaroj Sienkiewicz vizitis laŭvice Varsovion, Zakopane, Konstantinopolon, Italion, Atenon, Krakovon, Litovion, ankoraŭfoje Krakovon, Vienon, Opaton, Belgion, Anglion, Francion, Germanion, Zakopane, Radziejowice, Kaltenleutgeben, Sopoton, Ostendon, Hispanion, Parizon, denove Krakovon.

La jaron 1891 plenigas restado en Egiptio, la mara vojaĝo al Zanzibaro, febro kaj ties kuracado en Zakopane kaj Kaltenleutgeben. Dum postaj du jaroj Sienkiewicz migras tra Pollando, Aŭstrio kaj Germanio, ekkonas familion Włodkiewicz, fianĉiĝas al la laŭvica Maria — tre juna Marynuszka, kaj venkinte malvolon de la estonta bopatrino edziĝas fine de la jaro 1893 en Krakovo. La novgeedza paro forveturas trapasi la mielmonaton en Italio. En Nervi la edzino fuĝas de la verkisto. Post dujara strebado Sienkiewicz ricevas la divorcon.

Sienkiewicz komence neniam estis bone salajrita kontraŭ siaj literaturaĵoj. Estis tamen unu escepto. Kontraŭ historia romano *Sinjoro Wołodyjowski* (1888) li ricevis 8 mil da rubloj (4 mil da dolaroj). Malgraŭ ne entute alta nivelo de la ekzistado li ne estis posedema. Kiam nekonata donacanto destinis al la verkisto 15 mil da rubloj — li tuj transdonis ilin al Akademio de la Sciencoj, por artistoj kaj sciencistoj malsanaj je ftizo.

En decembro 1896 multaj urboj festis la 25-jariĝon de lia verkado. La Imperiestra Akademio de la Sciencoj en Petersburgo pridonacis lin per la aneco. Poste, kiel ĉiam, li vojaĝas,

zorgas fondi monumenton al Adam Mickiewicz en Varsovio, ekkonas la laŭvican amon — Maria Radziejewska. Dum jubilea solenaĵo en Jagellona Universitato, en la jaro 1900, Sienkiewicz ricevas doktorecon *honoris causa*. Ankaŭ Poznano kaj Lvovo festas solenaĵojn omaĝe al li. La plej grandiozan feston oni organizis en la varsovia urbodomo. Dum ĝi la verkisto ricevis Obłęgorek-biendomon kaj bienon apud Kielce, kiel „la donacon nacian”. Grava akcento de la agado kontraŭprusia estis proklamo, en kiu la verkisto defendis infanojn de Września.

Pri populareco de Sienkiewicz atestas ekspozicio de la polaj pentristoj, kiuj instruis liajn verkojn. La ekspozicio vizitis multajn urbojn en Rusio.

Junaj verkistoj, precipe Stanisław Brzozowski protestas kontraŭ elpaŝo de Sienkiewicz, kiu kondamnis troon da erotismo en liaj verkoj.

La jaro 1904 alportas al la verkisto la francan Honoran Legion, edziĝon kun la parencino Maria Babska kaj *La leteron malfermitan de polo al la rusa ministro* postulanta aŭtonomion de la pola eduka sistemo.

La 10an de decembro 1905, pro elstara agado sur la literatura kampo, Henryk Sienkiewicz fariĝis la Nobel-premiito en Stokholmo.

Dum lastaj dek jaroj de la vivo Sienkiewicz verkas, okupiĝas pri kulturo kaj politiko, protestas kontraŭ diversaj maljustaĵoj. *La leteron malfermitan al Lia Imperiestra Moŝto Wilhelm II, Prusia Reĝo* kontraŭ antipola politiko publikigis gazetararo de

preskaŭ tuta Eŭropo.

La verkisto vojaĝas i.a. al Svisio, kie — loĝante en Vevey — li sukcesis organizi Svisan Ĝeneralan Komitaton pri Helpe al Viktimoj de la Milito en Pollando.

La 15an de novembro 1916, sepdekjaraĝa Sienkiewicz mortas pro sklerozo de la koronarioj.

La 27an de oktobro 1924 oni venigis liajn cindrojn al la lando kaj entombigis en subteraĵoj de la Katedralo al Sankta Johano, en Varsovio.

Ofte ŝanĝante lokon de la restado, ne vizitante la societan vivion, partoprenante en kampanioj politikaj kaj sociaj, multa laborante, Sienkiewicz trovadis iamaniere la tempon kaj emon por multaj amikecoj. Al liaj amikoj apartenis ekz. elstaraj loĝantoj de Zakopane — pentristo kaj verkisto Stanisław Ignacy Witkiewicz, kuracisto, d-ro Tytus Chałubiński, geedzoj Dembowski — kompetentuloj pri la montarana kulturo, montaranoj—violonistoj Sabala kaj Obrochta, montar—gvidantoj Wojtek Roj kaj Klimek Bachleda. Liaj amikoj estis pentristo Józef Chełmoński kaj aktorino Helena Modrzejewska kun la familio.

Sed la plej interesa lia amikeco estis direktita al Jadwiga Janczewska, fratino de la mortinta, unua edzino. Kiam Sienkiewicz por kurta aŭ longa tempo vizitadis Krakovon, ĉiam povis trovi veran hejmon ĉe la bofrato, profesoro Edward Janczewski kaj lia edzino Jadwiga, virino inteligenta kaj ĉarma, dum multaj jaroj certigadis al la verkisto tion, kion forprenis de li

sorto — profundan amikecon, konsilojn kaj konsolojn dum ĉiutagaj klopodoj, kaj eblecon pridiskuti konceptojn de la estontaj verkoj. Ŝi scipovis krei por li atmosferon de la sentema, virina zorgo. Ĉi nekutiman rilaton respiegulas aro de 500 leteroj el la jaroj 1879–1916, estanta parte taglibro, parte memorlibro. Ĝi apartenas al majstroverkoj de la epistolografio.

Simile al multaj samaĝuloj Sienkiewicz komencis la verkistan agadon de la ĵurnalista laboro. Sociaj problemoj esencaj por tiama publika opinio videbliĝas kaj en artikoloj kaj en noveloj.

Carismo imitis ekster Rusio rolon de „zorganto pri slavo”, sed poloj estis subpremitaj en juĝejo, lernejo kaj preĝejo. Ĉi metodojn la verkisto kondamnis en noveloj *Skizoj per karbo* kaj *El memorlibro de la repetitoro*. Ili ambaŭ pro krajono de la cenzuristo aperis en la mildigita formo.

Dum la tuta vivo Sienkiewicz per artikoloj, kampanioj kaj la propra agado batalis kontraŭ carismo kaj okupiĝis pri la problemoj sociaj — malriĉeco, malsato, senlaboreco. En la efika agado, kiu povus lin kontentigi, malhelpis al li la kormalsano kaj sklerozo. Li plendis:

Oni ne permesas al mi multe labori. Antaŭ ĉio tamen oni konsilis al mi kvieton, do medikamenton la plej malfacilan por atingi — pro kaŭzoj publikaj kaj personaj.

Kiam la 22an de novembro en svisa Vevey oni entombigis la grandan polon — aperis florkronoj de la angla reĝo, sed ankaŭ (kia ironio!) de

regantoj aŭstra kaj germana. Ĉe lia ĉerko staris standardistoj kun polaj standardoj prezervitaj en Rappersmil. Ĉi tiu nekutima omaĝo de Eŭropo estis pruvo agnoski ne nur elstaran verkiston, sed ankaŭ politikan aganton, adepton de la afero ankoraŭ neebila, sed post nemultaj jaroj — venka.

La mondan famon Henryk Sienkiewicz gajnis kiel literaturisto. Pli ol kvardek jaroj li verkis romanojn, kiuj ĝis nun konservis „la vangruĝon de la vivo”. Noveloj kaj ĵurnalistaj laboroj ankaŭ indas nian atenton, eĉ ĉi unuaj: *Idilio*, *La olda servisto* kaj *Hania*.

Laborante kiel ĵurnalista en *La Pola Gazeto* krom recenzoj kaj artikoloj, Sienkiewicz de la jaro 1869 verkis studaĵojn pri la baroka poeto Mikołaj Sęp-Szarzyński, romanon *Vane* kaj *Humuraĵojn el teko de Worszytło*, eldonitaj sub pseŭdonomo Litwos.

Estante en Ameriko li sendis al *La Pola Gazeto* du tekstojn: *Skizoj per karbo* kaj *Leteroj el vojaĝo*. Skizoj kaŭzis pasian gazetan disputon, je kiu la aŭtoro akre reagis substrekte, ke idealizigo de stultuloj, aŭ de la kamparana vivo en literaturo realisma estas kompleta sensencaĵo. Leteroj el vojaĝo alportas rimarkojn de la atentema observanto de la vivo, sed ankaŭ grandiozajn priskribojn de la naturo — de akvofalo Niagaro, de montoj Santa Ana. Humuro akompanas precipe al relacio pri malsukcesa restado de polaj koloniuloj en Anaheim.

Ameriko fekundigis la verkistan

imagon ankaŭ post reveno al Eŭropo. Kelkaj noveloj prezentas vizion de la polaj elmigrintoj (*Lanternisto*, *Tra stepoj*, *Rememoraĵo el Maripoza*), aliaj — *Sachem*, *Orso*, *Komedio de eraroj* rilatas al la amerika vivo, al afero de indianoj, batalantaj tiam malespere pri la rajto vivi.

Novelo *Pro pano* montras sorton de la kamparano—elmigrinto, kiu sen la helpo devas pereji en la fremda mondo. Profunde kompatemaj noveloj pri neniigitaj kapabloj de la vilaĝaj infanoj kun *Janko muzikanto* alfronte realigis laŭprograman principon de la epoko, „laboron ĉe la bazo” kaj kunigis verkon de Sienkiewicz kun verkoj de samaĝuloj — Prus, Orzeszkowa, Konopnicka, Dygasiński. Ĝenerale novelo de Sienkiewicz plektas kaj ligas ecojn malproksimajn, tragedion kun humuro kaj grotesko, majeston, ironion kaj farson, lirikon kun dramo. Tiaj ankaŭ estas skizo *Ekskurso al Ateno* kaj humuraĵo *Ŝi, la tria*.

Multajn jarojn de la peniga laboro la verkisto dediĉis al la vastaj romanoj, trilogio s.t. *Per la fajro kaj glavo*, *Diluvo* kaj *Sinjoro Wołodyjowski*. La inspiroj peraj kaj senperaj estis kelkaj: literaturo de Mickiewicz, Słowacki kaj Krąszewski, vivo kaj kutimoj de polaj, orientaj biendomoj, epika tradicio, laŭ kiu heroo ne bezonas magion kaj eksterordinarecon, sed nur forton de la propra animo. Rolis ĉi tie ankaŭ publikaĵoj, kiuj aŭ demandis pri kaŭzoj de falo de la pola ŝtato, aŭ strebis forigi de la socio tiuj malavantaĝoj, kiuj kaŭzis dispartigon de Pollando inter tri invadintoj.

Ŝajne ĉiuj tri partoj de la trilogio laŭ la konstruacia vidpunkto aspektas simile, ĉar la amhistorio kun obstakloj estas fiksita surfone de la naciaj bataloj kontraŭ fremaj invadantoj. Fraŭlinon–heroinon strebas gajni du rivaloj — pola oficiro kaj reprezentanto de la malamiko. Dum la milita kaoso ĉiu el rivaloj de la pola oficiro kaptas la knabinon, sed ne povas atingi ŝian reciprokecon. Finfine post multaj aventuroj trovas ŝin polo kaj fariĝas ŝia edzo. Tamen en ĉiu parto de trilogio la aferoj okazadas indvidue, ĉiu ino alie reagis je amdeklaroj, ĉiun alimaniere reakiras la fianĉo aŭ edzo. En du unuaj romanoj gefianĉoj flamas pro la amo post la unua rigardo, en tria romano ameman sinjoron Wołodyjowski fraŭlino igas al kompreno, ke ĝuste ŝi devas esti lia elektinto. Arto de Sienkiewicz fiksas je skemo de la ama triangulo tiom da aventuroj neordinaraj, sed probablaj, ke la leganto eĉ rimarkas similaĵojn. Sangaj interbatiĝoj en drinkejoj, dueloj, fuĝoj kaj postkuroj, forkaptado de fraŭlinoj, estis fiksitaj en kulturo de la deksepa jarcento. Herooj de Sienkiewicz, simile kiel ĉe Dumas–patrino, estas la amika grupo ligita per la soldata servo. Volonte la verkisto utiligis historiajn nomojn. Elpaŝis reĝoj Jan Kazimierz kaj Karol Gustaw, komandantoj — Wiśniowiecki, Czarniecki, Sapieha, Radziwiłł, Sobieski, Chmielnicki, Tuhaj–bej, ĉe kiuj svarmas multaj herooj fikciaj. La verkisto scipovas streĉi atenton de la leganto ĝis la definitiva limo, suprenstikigante danĝerojn kaj elkondukante siajn he-

roojn el ili kun la neelĉerpebla inventemo.


Eksterordinara klarvido de personoj, de araj scenoj, okazintaĵoj kaj bataloj permesas kompari ĉi verkon kun bildoj de Jan Matejko.

Sienkiewicz lerte manovras per la estetikaj kvalitoj. Al la eŭropa galerio de soldatoj–memlaŭduloj, infanoj de Plaŭto li aldonis la polan, tiom grandiozan, ke Zagłoba plenumante en ĉiuj tri romanoj gravan funkcion kontraŭstari al patoso, pro bonkvalita humuro povas okupi unu el plej altaj lokoj.

Bonegan aplikon de la majesteco oni povas rimarki en bildo de morto de Longinus Podbipięta, stilizita laŭ martireco de la sankta Sebastiano.

Scenoj de rememoroj ĉe kanto de najtingalo povas establi ekzemplojn de la bedaŭroplena lirikismo.

Metaforoj laŭ maniero de Homero pruvigas, ke la aŭtoro konscie dezi-



ras uzi antikvan modelon por priskribi batalojn. Plaĉis, ankaŭ la egalranga traktado de historio kaj de la amaj motivoj kun ĝi ligitaj.

Populareco de trilogio tuj tradukita al kelkajn lingvojn apogis je ĝiaj artaj valoroj (Jeremiah Curtin, la amerikano tradukinton, Sienkiewicz konis persone). Por polaj legantoj la plej esenca estis ĝia ideologio politika-patriotisma. La ofta opinio, ke Pollando falis pro la nobela anarkio kaj ties konsekvencoj — malforto de la ŝtata organizo, ĉagrenis tiujn, kiuj pli frue aŭ pli malfrue atendis reakiron de la sendependeco kaj zorgis, ĉu polaj, naciaj ecoj tion ne neniigos.

Sienkiewicz elpaŝis kun la propra interpreto de la pasinteco. De tiuj dudek kvin jaroj inter 1648 kaj 1673, dum kiuj tiamaj memorlibristoj rimarkis katastrofojn politikajn, enlandajn militojn kaj militojn kontraŭ agresemaj najbaroj. La interna milito komencita de Chmielnicki, finita per aligo de Ukrainio al Rusio, la sveda milito, kiu ruinigis la landon antaŭ ĉio ekonomie, multjaraj bataloj kontraŭ Turkio malplifortigis Pollandon tiel, ke post cent jaroj ĝi fariĝis facila akiraĵo de la avidaj najbaroj. Sed tio okazis fine de la XVIII jarcento; en jarcento XVII Pollando sukcesis eviti la pereon danke al heroeco de ĉiuj klasoj, de reĝo ĝis kamparanoj kaj montaranoj. Ideologio prezentanta fidon al biologia forto de la nacio estis tiom forta, ke trilogion admiris eĉ historiistoj Tarnowski kaj Smolka, kvankam ĝi kontraŭstaris al ilia sinteno.

Legantoj sentantaj premon de la

invadantoj trovis en trilogio fonton de la energio. Pri tiu valoro de sia verko sciis la aŭtoro mem skribante, ke la verko alportas „refreŝigon de la koroj”.

Famon de Sienkiewicz akiritan per la trilogio mondscale firmigis *Quo vadis* (1896), „romano de tempo de Nerono”. Plaĉon al antikvaj tempoj akiritan en lernejo pliprofundigis rilatoj kun universitataj aŭtoritatoj pri Grekio kaj Romo — Kazimierz Morawski kaj Stefan Pawlicki, ankaŭ kun pentristo de antikvaj temoj Henryk Siemiradzki. La ĝeneraleŭropa literaturo ofte pli bone aŭ pli malbone realigis tiutempe temaron rilatantan al la frua kristanismo, kiel ekz. Ben Hur de Wallace. *Quo vadis* ankaŭ apogas je ideo de triangulo heroo, montranta surfone de batalo inter du potencoj — kulturo de la pagana Romo kaj naskiĝanta en katakumboj kristanismo. Pagana patricio sub influo de la amo fariĝas kristano. Elstara reprezentanto de la roma kulturo, Petronio, devas memmortigi sin pro malfavoro de imperiestro Nerono. Tio delikate antaŭvidas la estontecon. La historia motivo — regado de Nerono kun incendio de Romo en la jaro 64, kaŭzita laŭ Nerono de kristanoj, kaj unuaj persekutoj de kristanoj, interplektas kun motivo ama.

La plej interesa trajto de la ama motivo en *Quo vadis* estas deveno de Ligia. Amatino de Wincjusz estas slavino, filino de estro de silezia gento nomata Ligoj. Sienkiewicz utiligis mension pri Ligoj tralegitan ĉe Tacito, por ligi historion de Romo kaj de

kristanismo kun prehistorio de Pollando.

Feliĉe la aŭtoro ne riskis disputon mondkonceptan inter reprezentantoj de du kulturoj, sentante anakronismon de tia situacio en la jaro 64. Anstataŭis ĝin per malestima rimarko de Petronio pri vidpunkto, kiu ne meritis lian atenton. Apenaŭ rimarkeblaj, tamen ekzistas en ĉi romano momentoj „por refreŝigo de la koroj”. Sklavo Ursus venkas sur la cirka areno germanan uron, al kiu oni ligis Ligian. La epilogo certigas pri venonta venko de la bona afero super perforto de la tirano.

En romano *Kruckavaliroj* Sienkiewicz volis montri komencon de la granda, historia procezo nomata „la jagellona ideo”, kies fino estis respegulita en *Per la fajro kaj glavo*. Bone provita maniero — ligi historion de la nacio kun vivo de kelkaj reprezentantoj, denove substrekante la aman motivon, rilatas ĉi foje al dekdu jaroj finitaj per la fama batalo apud Grunwald en 1410 jaro, kiu reguligas rilatojn inter Pollando kaj Kruckavalira Ordeno por kelkaj centjaroj. La unua edziĝo de Zbyszko el Bogdaniec estis kruele signita per fio de kruckavaliroj, kiuj igis morton de lia unua edzino Danuŝka kaj la bopatron Jurand senigis okulojn kaj langon. La dua edziĝo — kun Jagienka malfermas optimisme esperon longe, bonstate vivi kaj reatingi grandan nombron kaj signifon de la pereanta gento.

Ni ricevas en romano *Kruckavaliroj* ne nur aventurojn kaj priskribojn de bataloj, sed ankaŭ vastan bil-

don de la mezepoka vivo, de vojaĝoj kaj ĉasadoj, amuzoj kaj bankedoj, de la vilaĝa mastrumado kaj buntajn priskribojn de la naturo. Ni povas observi kortegojn reĝan kaj princajn, klostrojn, domojn de kavaliroj, vilaĝaj drinkejoj, sur kies fono la verkisto montras morojn kaj kutimojn, manĝaĵojn kaj popolajn rimedojn kuraci, vestojn, ĉasistajn scenojn.

Tre interesa estas lingvaĵo en verko de Sienkiewicz. En noveloj pri vivo de popolo li uzas dialekton, kio estas relative facila kaj memkomprenebla. Pli malfacilan taskon havis la verkisto en historiaj romanoj. Arkaizaĵoj de trilogio estas apogitaj je lingvaĵo de memorlibristoj de la baroka epoko, *Quo vadis* havas lingvaĵon konkordan kun tradicio de la pola renesanco, fiksita de Orzechowski, Górnicki, Skarga — ŝatantoj de Cicerono. En *Kruckavaliroj* oni devis



preskaŭ ĉion elpensi, ĉar pri nia mezepoka lingvo oni malmulte tiam sciis. La montrilon liveris esploristoj de dialektoj, kiuj asertis, ke dialektoj konservis multe da lingvaj formoj, jam ne uzataj en ĝeneralnacia lingvo literatura. Sienkiewicz povis supozi, ke la montarana dialekto, precipe arkaika, taŭgas al liaj bezonoj. Dekkelkfoje estante en Zakopane li interparolis kun montaranoj, do tiun dialekton li konis senriproĉe. Majstre li utiligis ĝin en sia verko, evitante embuskojn kaj erarojn minacantajn ĉiam ĉi-tipaj laboroj. La kritikistoj akceptis la romanon entuziasme, ĝi gajnis ankaŭ grandan legemon ĉe la vasta publiko.

Dum venontaj sep jaroj Sienkiewicz ripozis post la granda peno. Li provis verki, sed la popularecon atingis nur porjunulara, aventura romano *Tra dezerto kaj praarbaro* publikigita en la jaro 1911. Historion prezentas en la romana materialo Abd Allah al-Mahdi, la organizanto de la sankta milito kontraŭ profanoj en Sudano, kiu mortis en la jaro 1885 kaj partopreno de polaj inĝenieroj en laboroj ĉe la sueza kanalo. Ruze kaptitaj de araboj infanoj de inĝenieroj, anglo kaj polo — travivas multajn danĝerajn aventurojn sur la nigra tero. Pola knabo Staś estas heroo, brava kaj saĝa zorganto pri 6-jara angolino Nel. Infanoj kaj triopo de junaj negroj migras tra Afriko por renkonti la patrojn. Ili kontaktiĝis kun la sovaĝa naturo de la ĝangalo, ekkonas ekzotikajn bestojn kaj loĝantojn de la afrikaj vilaĝoj. Al ĉio—ĉi akompanas

nekutimaj okazintaĵoj kaj varma humuro, kio decidas pri tio, ke la novaj generacioj deziras legi la romanon aŭ almenaŭ rigardi filmitan.

Du nuntempaj romanoj de Sienkiewicz ne tiel popularaj kiel historiaj, tamen estas interesaj. *Sen dogmo* (1891) la memorlibro de la moderna dekadencisto aperis en la modernisma kaj novromantisma periodo, kiam laŭmoda fariĝis psikologio en romano kaj dramo.

Memanalizo psikologia fare de Leon Płoszowski, heroo de *Sen dogmo*, skeptikulo, elegantulo utiliganta havaĵon de antaŭuloj, zorgeme klerigita mondumano kaj sencela vivo igis du malsanojn — enuon kaj mankon de la volo. Pro malebleco decidi, ĉu ligiĝi kun la ĉarma kuzino aŭ ne, la situacio fariĝas simila al tiu el *Eŭgeno Onegin*. Kiam finfine li maturis al la jesa decido — Anielka jam estas edzino de la aliulo. Ŝi mortas, li memmortigas sin. Malgraŭ riproĉoj pri ripetoj kaj altrudemaj substrekoj — grandaj rusaj realistoj Tolstoj kaj Ĉehov bone akceptis la verkon. La dua skribis en letero al tradukanto Ławrow: „Kaj tamen la tuto estas bela, varma kaj bunta, kaj homo, kiam legas, volus edziĝi al Anielka kaj matenmanĝi en Płoszów”.

Familio Połaniecki (nuntempa romano de 1895 j.), vasta bildo de la varsovia vivo laŭ intencoj de la aŭtoro provis montri bildon de la komplikigita procezo ekonomia—socia. Filoj de familioj, kiuj perdis vilaĝajn bienojn kun mono gajnita pro la urbaj potencoj revenadis al vilaĝo kaj reaĉetadis

bienojn de la patroj, ĉar ili kredis je milito, ke nur vilaĝo estas Arkadio unusole inda por la honesta homo.

Satiraj akcentoj en priskribo de hipokriteco de la salona vivo ekzistis, sed estis malfortaj, do Czechow, Brzozowski kaj aliaj tra legis la romanon kiel apologion de la obskurantuloj. Czechow skribis rekte kaj akre pri ĝi kiel pri „pola dolĉa fromaĝkuko kun vanilo”.

Pri la lasta romano *Kirliĝoj* la kritikistoj mutas kaj legantoj ne memoras, ke la konata verkisto estas ĝia aŭtoro.

La esperantistaj aŭtoroj ĝuste taksis valorajojn de la prozo de Henryk Sienkiewicz. Antoni Grabowski en la jaro 1891 tradukis novelon pri la neglektitaj kapabloj de la vilaĝa infano *Janko-muzikanto*, en la jaro 1908 novelon *La juĝo de Oziris* kaj en la jaro 1913 plenan de bonkvalita humuro novelon el vivo de artistoj *Ŝi, la tria*.

Novelon *Ni sekvu lin* en la jaro 1909 esperantistigis Bronisław Kuhl; la sama aŭtoro tradukis en la jaro 1912 la drambildon *Kiu estas kulpa?*

Lidia Zamenhof estas aŭtorino de Esperanta versio de la romano *Quo vadis*, traktanta pri tempoj de la romana imperiestro Nerono kaj pri unuaj kristanoj. Ĉi verko aperis en jaroj 1933 kaj 1958. Ŝi ankaŭ tradukis novelojn (*Noveloj*, 1925).

Kazimierz Bein (Kabe) esperantigis en la jaro 1906 novelojn *Lanternisto*, *Ĉe la fonto* kaj hindan legendon *Du herbejoj*.

Rakonton *Orso* en 1933 tradukis Oberrotman, scenojn el *Tra dezerto kaj praarbaro* en 1936 esperantigis van Zon.

Mieczysław Sygnarski faris kaj eldonis en la jaro 1978 tradukon de la porjunulara aventuro-romano *Tra dezerto kaj praarbaro*. Tiuj literaturaĵoj meritas apartan artikolon.

Ĝus hodiaŭ oni povas paroli pri la moderna esplorado de la verko kaj vivo de Sienkiewicz. Evidentiĝis, ke li estas realisto alte taksanta belecon de la mondo, scipovanta plaste ĝin priskribi. Li observadis homojn, naturon kun la faŭno kaj flaŭro, popolojn kaj naciojn nuntempajn, kaj dum ilia pasinteco. Grandioza talento de rakonto, bunta kaj riĉa lingvaĵo, homaj tragedioj kaj komedioj priskribantaj dinamike kaj drame, parolas forte al la imago de la leganto.

Sienkiewicz estis estimanto de heroeco, de fizika forto, sed antaŭ ĉio de la morala sinteno. Fonto de tiu ĉi kulto estis fido de la verkisto en valoron de la homo, konvinko ke la brava homo en ĉiu situacio venkos, kaj se eĉ li pereos, restos post li almenaŭ la bona memoro.

Intuicie la verkisto komprenis bezonojn de la vastaj rondoj da legantoj, eternan homan deziron rigardi bildojn de la heroeco montrita laŭ arte perfekta maniero. Tiel ni emas hodiaŭ kompreni ĝeneralhoman kaj polan sencon de la formulo pri „la plifortigo de la koroj”.

Lidia Ligęza

Halina Poŝwiatowska

Ĉiuj miaj mortoj

(parto dua)

Mi — Julia
estas 23-jara
tuŝis iam la amon
ĝi havis amaran guston
kiel taso da nigra kafo
intensigis
ritmon de l' koro
incitis
mian vivan organismon
dislulis sensojn

ĝi foriris

Mi — Julia
sur alta balkono
krias — revenu
vokas — revenu
makulas
la morditajn lipojn
per koloro de l' sango

ĝi ne revenis

Mi — Julia
estas miljaraĝa
mi vivas —

kian sentemon mi bezonas
diru
por dispeli ombrojn sub la okuloj
kian kareson por de l' buŝa streketo
eligi plenen de l' luno aŭ floro

kian amon
por estingi krateron vibrantan
malfermitan vundon de l' tero
kiu ne volas cikatriĝi
aŭ simple ne povas

foje
treege sopirema
mi aperas al homoj
kun estinta vizaĝo
iras per miaj eksaj piedoj
kaj tuŝas ilin per rido
per estintaj manoj

sed malkaŝas min la haŭtdiafano
similanta al strukturo de papero
kaj malmovo de ombro
post traĭro mia
mankas la plej eta spuro sur la neĝo

kaj subite frapitaj ili scias
disŝovas sin ektimigitaj
oferante al mi grandan blankan spacon
sen horizonto.

ankoraŭ mi ne menciis pri la amo

amo
jes ĝi unusola
ne dependas de la tempopaso
daŭras —
se ekzistas — eternas
kaj se ne

oceanaj klepsidroj rulas la sablerojn
senripoze la luno orvizaĝon ŝanĝas
tra la tenebra mondo flugas ega vento

ne ekzistas kompato
ne ekzistas redempto
ne ekzistas ni
ne ekzistas
ne

ĉi tiu amo estas kondamnito
kun verdikto morti
ĝi mortos
post mallongaj du monatoj

monde ekzistas spaco kaj tempo
vi forlasos min
monde ekzistas feblo kaj neceso
mi vin haltigos
per nenia kiso

ekverdiĝis tapiŝo brodita en florojn
kaj Kant estas kiel rafanetoj freŝa
kaj aroma
mi dismordas pulpon kaj sur la lango
sentas
guston akran de argumento

mi glutas filozofion
iu avertadis
ke saĝon oni devas maĉi
je unuopaj fibroj
per glutoj mi trinkas amon
kaj kiam oni devas
mi havas pli multe da larmoj
ol oceano
blanko — alkemio de sapo kaj akvo
verdo — implikitaj nervoj de trunketoj
en ambaŭ kunpremitaj manoj
mi tenas mondon nekompreneblan

kaj dume post la fenestro
aŭroro grandiĝas kiel rivero
kaj sur la placo vendobudoj ĉielen
enpaŝas vice

pasio estas tio
prikantita de l' violono
fermita en malhela ujo
sufokanta
kiel nokto
ene de ŝelo de l' brilo
signita per ungoj de l' steloj
ĝi vivas
en viaj vortoj de la varma granato
aromas kiel persiko
la suno
kaptita en verdan reton de l' arbo
matura
klinita super senkolora herbo
strebas
al miaj manoj etenditaj
kaj mi la fermitan buŝon
fremdlingve instruas
vorton — malvaston kiel morto
amo

interesa estas promontoro de ĉia espero
tie pasioj brilas
kiel kupraj vazoj
puraj
tie ŝvebas vaporoj
de l' avido

amo
vestita en nelongan mantelon
tremantan pro la malpacienco
kun genuoj sub la mentono
angule
siajn okulojn — lanternojn
sendas en mallumon
la okuloj — fajras

Estimata sinjoro Leja,
Zofia Banet–Fornalowa informis min pri via eldonejo „Hejme”, kiu aperigis ŝiajn verkojn pri Grabowski kaj „La Pereintoj in Memoriam”. Pri la lasta libro mi verkis recenzon, kiun vi eble ŝatus aperigi en „Pola Esperantisto”, kies redaktoro vi estas. Ĉion bonan al vi, al viaj eldonejoj kaj revuo!
Kore kaj estime,

Leen Deij, Nederlando

Jen la recenzo

La Pereintoj in Memoriam

de Zofia Banet–Fornalova

La germanaj nazioj gasumis ĉirkaŭ 4,5 milionojn da senkulpaj kaj sendependaj eŭropaj judoj. La plimulto loĝis en Polio.

En la antaŭparolo Zofia Banet diras, ke la Pereintoj troviĝas ĉie kaj nenie, ĉar iliaj gasumitaj korpoj estis forbruligitaj en koncentrejoj fornoj, kiuj funkciis tage... nokte.

En la libro reviviĝas ses Esperantaj Pereintoj: Leo Belmont, Halina Weinstein, Edvardo Wiesenfeld, Jakobo Ŝapiro, Izrael Lejzerowicz,



ĵaluzo
danco de l' rapidaj fingroj survitre
molo de l' neĝo
rabita volupteme
brulo de la spiro —
utiligo de la spacfragmentoj
vento —
ampleksanta ĉion
liganta disŝutitajn mondoelementojn
la perfekta ekzisto
kie mi atendas
volvita en globeton — frapon

tradukis: Lidia Ligeza

Salomon Kornfeld–Grenkamp, ĉiuj organizemaj kaj verkemaj intelektuloj.

Zofia Banet resonigas iliajn voĉojn, resentigas ilian idealismon. Tion ŝi faras per skizaj portretoj, kiuj ekzakte bildigas la homojn kaj per redono de iliaj verkaĵoj: rakontoj, poemoj, artikoloj. La stilo de la portretoj ne estas, ne devas esti eleganta aŭ sprita, sed ĝi estas farita kun respondosento. Kiel historiistino Zofia Banet konscias, ke persona retoriko kaj precipe ŝvelparoloj kaj ornamstilo povas damaĝi la Veron. La sobra redono ne nur servas la Veron, ĝi ankaŭ pli rekte trafas, pli profunde impresas la leganton.

La enhavo de la libro apartenas al la historio. Sed historio estas akumulita spirita energio, akumulita aspirado kaj klopodado. La esenco de la okazintaĵoj kaj la spirita heredaĵo de la Pereintoj vivu en ni kaj inter ni. Ke ni havas historion signifas, ke ni ne estas senhavaj, ne mankas al ni taskoj. Zofia Banet konsciencie plenumas sian taskon.

Leen Deij

Laŭ la promeso, ni publikigas la esperantistan biografion de red. Roman Dobrzyński, elektita ĉi-jare la Honora Membro de UEA.

50 JAROJN SUR LA ZAMENHOFA VOJO

esperantista biografio de Roman Dobrzyński

1937 (01.11) — RD naskiĝis en Varsovio (okaze de la 50-jariĝo de Esperanto kaj la jubilea UK).

1939–45 — transvivis bombadon de Varsovio fare de la germana Luftwaffe en rifuĝejo (Kredytowa 5), 200 metrojn de la familio Zamenhof (Królewska 41); pasigis infanecon en la naskiĝvilaĝo de la patrino, (eksciis, ke homoj parolas pole, germane kaj ruse, pro tio ili intermitas).

1951–54 — lernis, ĉampionis pri gimnastiko.

1955 — esperantistiĝis, fininte kurson gvidatan de Tadeusz Michalski, sekve (1956) partoprenis kurson de Julio Baghy, helpe de li tradukis en Esperanton la polan popolan kanton „Iris knabineto”, kiu disvastiĝis tra Esperantujo kaj estas ĝis nun kantata; komencis korespondi kun fremdlandaj esperantistoj, iumomente kun 30 personoj.

1956–63 — studis en Varsovia Universitato, magistriĝis pri juro kaj sekve pri ĵurnalismo pere de la verko „Funkcioj de la Esperanta Gazetaro”, dank’ al helpo de aŭstraj esperantistoj li faris esploran en la Esperanto-Muzeo en Vieno; tiamaniere ekestis verŝajne la unua universitata verko en Pollando; dum la studoj instruis Esperanton en diversaj lokoj; por la kursaj celoj verkis libreton „La Nigra Kokino”, kiu kelkfoje reeldo-

nata aperis sume en 30 mil ekzempleroj.

1956–58 — aktivis en la skolta movado (repermesita en la jaro 1956), ene de kiu propagandis kaj instruis Esperanton, varbis tie Barbara Pietrzak (tiam Przybysz), la aktualan estron de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio; pli malfrue (1963-64) kunlaboris kun Andrzej Grzębowski en disvastigado de Esperanto ene de la Pola Skolta Asocio.

1957 — partoprenis la unuan post la milito privatan eksterlandan ekskurson de la polaj esperantistoj; vizitis Hungarion, Rumanion kaj Bulgarion; (1958) vizitis memstare Jugoslavion; la vojaĝoj konvinkis lin pri la praktika kaj idea valoroj de Esperanto.

1958–62 — fondis kaj gvidis Esperantan kabaredon „La Verda Simio”; konvinkiĝis definitive, ke Esperanto estas vera lingvo, ĉar homoj ridegis dum spektakloj; la kabaredan teamon konsistigis studentoj de teatra kaj muzika altlernejoj, kelkaj el ili iĝis elstaraj artistoj.

1959 — partoprenis (ĉefe en giĉetoj) la jubilean 44an UK en Varsovio okaze de la centjara naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof; samjare ekagis en Pola Esperanto-Junularo fondita de Marek Pietrzak; (1960) fariĝis ĝia estrarano respondeca pri NEOj, t.e. kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj; unue PEJ

koncentriĝis pri kunlaboro kun ZMW, granda organizaĵo de kamparana junularo, poste la ĉefa celo estis ZSP (Asocio de Polaj Studentoj), la kunlaboro estis aparte efika, kiam Marek Pietrzak eklaboris kiel oficisto en la centra sidejo de ZSP (Ordynacka) kaj **RD** estis redaktoro de ĝia organo „itd”. Tiel kreiĝis favoraj kondiĉoj de estonta aktivado por Esperanto en la studenta medio. La ideo de NEOj estis poste aplikata enkadre de TEJO.

1960–63 — prezidanto de Pola Esperanto-Junularo; redaktis organon de PEJ „Tamen”, kiu pledis por realismaj agadmetodoj. PEJ estis tiam tre aktiva Esperanto-organizaĵo, ĝian kongreson en Bytom (1962) partoprenis ĉ. 600 gejunuloj.

1961 — kiel prezidanto de PEJ partoprenis la 17an Internacian Junularan Kongreson en Wakingham (Britio), konatiĝis tie kun la estontaj „gigantoj” de la movado (H. Tonkin, J. Wells, U. Lins, C. Minnaja, V. Sadler, E. Weide, la fratoj Mastermann k.a.); prilaboris kun Uwe Joachim Moritz kaj subskribis senprecedencan kontrakton pri kunlaboro inter PEJ kaj Germana Esperanto-Junularo. La kontrakto antaŭis la ekligon de formalaj rilatoj inter Pollando kaj F.R. Germanio kaj la faman „Leteron de la episkoparo” (*Ni pardonpetas kaj petas pardonon*).

1963–65 — redaktis organon de PEA „Pola Esperantisto”; ŝanĝis ĝian enhavon kaj grafikan aspekton, certigis al ĝi altan eldonkvanton (2100 ekzempleroj) kaj regulan aperadon, kvankam eldona proceduro de unu numero daŭris tiam kvar monatojn. Li kunlaborigis elstarajn esperantistojn kiel Emilian Loth, Krystyna Kolińska, Jerzy Uśpieński, Jerzy Grum, Jan Zawada, Tadeusz Michalski, Andrzej Pettyn, kio helpis gar-

di altan nivelon de la revuo kaj faris ĝin leginda por ambaŭ generacioj. (La tiama problemo estis generacia breĉo, mankis la meza generacio kiel sekvo de la milita kaj stalinisma periodo).

1964 — fininte siajn studojn pri ĵurnalismo kaj ne trovinte laboron, decidis helpi sin per Esperanto; dank’ al hispanaj esperantistoj ricevis vizon por Hispanio, sukcesis rompi la duoblan „feran kurtenon” kaj per motorbiciklo rondvojaĝis Hispanion kiel la unua pola ĵurnalisto post la milito; publikigis multajn artikolojn kaj libron, kiu liveris al li famon kaj konstantan okupon en populara studenta semajnevuo „itd”. (1965) — faris alian motorbiciklan vojaĝon tra la Okcidenta Germanio laŭ invito de Germana Esperanto-Junularo, la vojaĝo fruktis per multaj publikaĵoj.

1967 — edziĝis al esperantistino el Hamburgo, Erika Rauschert, kiu sekve translokiĝis al Varsovio; ilia hejma lingvo estis Esperanto; (1967) naskiĝis filo Feliks kaj (1969) filino Ewa.

1968 — estis elektita vicprezidanto de TEJO, redaktis la revuon de TEJO „Kontrasto”.

1969–77 — absorbita de la familia vivo kaj profesia kariero li pasive partoprenis E-movadon, tamen daŭre aperigadis pri Esperantajn publikaĵojn en la pola gazetaro, radio kaj televido. Li publikigis en la pola lingvo 8 librojn pri Ibero–Amerika mondo. (1987) ricevis prestiĝan premion „Argenta Globo” pro la libro pri Portugalio; pli frue (1980) estis rekonita fare de Pola Ĵurnalista Asocio la plej bona pola ĵurnalisto verkanta pri internaciaj aferoj.

1973–2005 — laboris ĉe la Pola Televido, okupiĝis ĉefe pri la iberoamerika mondo (Hispanio, Portugalio, Latinameriko); dum longa tempo estis tutlande populara ĵurnalisto; plurfo-

je utilisigis sian popularecon por propagandi Esperanton; aplikadis la metodon de ne-rekta propagando, t.e. parolis ne pri Esperanto, sed montris funkciadon de Esperanto, kiel ekzemple en la filmo pri la esperantista edukejo en Brazilo „Bona Espero” (1984) aŭ en la filmo „La reveno al Finnlando” (1989); ofte „remburis” siajn filmojn per Esperantaj epizodoj; faris por la TVP plurajn studiajn programojn kaj du filmojn, kies ĉeftemo estis la lingvo internacia, nome „Esperanto” (1987), kiu okaze de la centjariĝo de Esperanto prezentis diversajn aspektojn de ĝia uzo en 12 landoj kaj „Muroj de miljaroj” — pri la Pekina UK (2004). Liaj filmoj estis kutime prezentataj en la 1a kanalo de la Pola TV kun multmiliona spektantaro.

1977–80 — estrarano de PEA pri kulturo, organizis kune kun Ewa Siurawska deklamkonkursojn pri E-literaturo kaj festivalojn de esperantlingva arta aktivado (OPERA).

1986 — RD, kiel konata televida ĵurnalisto, estis petita aliĝi al preparado de la jubilea Universala Kongreso; li rifuzis kunlabori kun la komisara estraro de Pola Esperanto-Asocio, nomumita de la ŝtato post la administra eksigo de ĉiuj organoj de PEA inkluzive de la Ĉefa Estraro kun d-ro Jerzy Leyk kiel prezidanto. Kune kun kelkaj elstaraj esperantistoj li postulis kunvokon de eksterordinara kunveno de delegitoj de PEA. La kunveno okazis novembre 1986. Ĉeestis speciale invitita d-ro Jerzy Leyk, kiu profitis la eblecon paroli al la delegitoj pri laboro de sia estraro kaj cirkonstancoj de ĝia eksigo. La Eksterordinara Kunveno de Delegitoj demokratie elektis novan sendependan Asocian Konsilantaron de PEA kaj Ĉefan Estraron kun Roman Dobrzyński kiel prezidanto, Paweł Janowczyk — ĝenerala sekretario

kaj Zofia Banet-Fornalowa — kasisto. Krome membroj de la ĈE respektive de la ĈK kaj aliaj organoj de PEA estis interalie aktivuloj de la Esperanta studenta movado: Jan Koszmaluk, Jarosław Parzyszek, Jerzy Rządcki, Wojciech Usakiewicz, Tomasz Chmielik, Paweł Wimmer kaj krome Tomasz Bedyński, Jagoda Greger kaj aliaj.

1987 — RD konsiderante la gravecon de la jubilea kongreso stimulis repaciĝon en la pola movado; kun la apogo kaj helpo de la prezidanto de UEA, prof. Humphrey Tonkin kaj ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojević, li sukcesis akiri komunan engaĝiĝon kaj sindonan kunlaboron de la pola esperantistaro, por okazigi la plej grandan Unversalan Kongreson en la ĝisnuna historio de Esperanto; aparte fruktodona rezultis lia peno interesigi pri la kongreso amaskomunikilojn, speciale la Polan Pres-Agentejon kaj la Polan Televidon, kies rezulto estis abunda propagando pri Esperanto. Li varbis por la funkcio de honora protektanto de la jubilea UK en Varsovio la prezidanton de la Sejmo (parlamento) Roman Malinowski, kiu multe kontribuis por la sukceso de la Kongreso.

1989 — estis elektita vicprezidanto de UEA dum la UK en Brighton, kie kontribuis al la senprecedenca aliĝo al UEA de Litova Esperanto-Asocio, dum Litovio estis ankoraŭ sovetia respubliko.

1987–2002 — RD inspiris la honoran protektanton de la jubilea UK Roman Malinowski lanĉi la ideon de „utila Zamenhof-monumento”, kio konkretiĝis kiel projekto konstrui en Bjalistoko Mondan Esperanto-Centron, kies celo estus evoluigi Esperanton kaj promocii la urbon; kontribuis al establo de la Zamenhof-Fondumo, la institucio respondeca pri realigo de la projekto; pri-

laboris organizan kaj programan fundamenton de la Fondumo kaj de la Monda Esperanto-Centro ĉefe kune kun Jarosław Parzyszek kaj Humphrey Tonkin, kiu fariĝis la unua prezidanto de la Zamenhof-Fondumo; estis reprezentanto de UEA en la Fondumo dum 14 jaroj, plenumante diversajn funkciojn, plej longe kiel prezidanto. RD kune kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof proponis al la Fondumo Zamenhof establi „Medalon de Toleremo”. La ideo naskiĝis dum la verkado de la libro „La Zamenhof-strato”. La unua ekzemplero de la medalo estis enmanigita de d-ro Zaleski-Zamenhof (honora patrono) kaj prof. Hanna Konopka (la tiama prezidanto) al la papo Johano Paŭlo la II dum la eklezia diservo en Drohiczyn la 10an de junio 1999. La ceremonion anatiis longa proceduro por akiri konsenton de la papo.

1992–1995 — RD Esperantigis la televidan lingvan kurson de BBC „Mazi en Gondolando”. Tiun verkon, senprecedencan en la movado laŭforme kaj laŭteknike, li realigis pere de la pola firmao „Tommy Publishers” kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago, en kunlaboro kun internacia teamo, ĉefe kun Mila van der Horst Kolińska (Nederlando).

1995 — malgraŭ korinfarkto ne sukcesis famiĝi en la rubriko „Ni funebras” dank’ al tuja operacio de la koro.

1993–2003 — verkadis en la pola lingvo kaj en Esperanto libron „La Zamenhof-Strato” kiel intervjua kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. (La dokumenta valoro de la libro konsistas en tio, ke ĝi rivelacias multajn nekonatajn faktojn pri la familio Zamenhof kaj Esperanto ĉefe el la tempo de la II mondmilito). La libro evidentiĝis fenomeno de la Esperanta literaturo, 1000 ekzempleroj eldonitaj en Litovio (2003) vendiĝis dum

unu jaro (la dua eldono aperis 2005) kaj tuj sekvis eldonoj en aliaj lingvoj: litova, kroata, japana kaj ĉeĥa. Dank al iniciato de la sekretario de EVA, Spomenka Štimec, la libro estas eldonota en la slovaka, slovena, hungara, latva kaj estona lingvoj. Krome ekzistas jam portugala kaj rusa tradukoj, finpretiĝas ukraina kaj itala.

1984–2005 — Esperantigadis siajn televidajn filmojn per propra mono, konsiderante ilin instrumento de aplikado de la lingvo parolata, ekzistas jam dudeko da ili. Pro sia laboro sur la filma kampo kaj pro la libro „La Zamenhof-strato” RD ricevis premion de la Fondaĵo „Grabowski” (2005). En la sama periodo li helpis aplikadon de Esperanto en turismo kaj prelegis en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, la unusola atlernejo kun Esperanto kiel instrulingvo.

2005 — Dum la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno li estis elektita fare de la Komitato de UEA (laŭ propono de la Ĉefa Estraro de PEA) honora membro de Universala Esperanto-Asocio. Kiel honora gasto li partoprenis la 62an Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Zakopane; ekde kelkaj jaroj li helpas unuopajn junajn esperantistojn partopreni Esperanto-kongresojn.

Ĉijare Roman Dobrzyński celebras 50-jariĝon de sia esperantisteco. Tiu ĉi datreveno komenciĝis per akuzoj pri lia ŝajna kunlaboro kun sekurec-servoj fare de „anonimaj polaj esperantistoj” (lia nomo troviĝas en la „listo de Wildstein”).

Ĉi akuzojn Roman ĝis nun publike ne komentis, kvankam en privata interparolo nomis ilin absurdaj.

Kazimierz Leja

LA PREPOZICIO „SUPER” EN PRAKTIKA UZADO

La prepozicio **super** estas relative malofte uzata de esperantistoj, tamen ĝi meritas nian specialan atenton. **Generale dirite, tiu ĉi prepozicio estas montranta:**

1. Pozicion de unu objekto rilate al alia objekto, troviĝanta pli malalte kaj ne tuŝanta ĝin (inter du objektoj estas ĉiam almenaŭ iome da spaco).

La pozicio de objekto povas esti sen translokiĝo (A) kaj kun translokiĝo (B). Ekz.:

A. En la infana ĉambro troviĝas du litoj, unu **super** la dua. Maljunaj salikoj pendas larĝe **super** la akvo. La suno staris longe **super** la horizonto. **Super** ni pendis la pura ĉielo. La ĉielarko aperinta **super** la urbo aspektis kiel diverskolora rubando. La verdaj flagoj gaje flirtis **super** la kongresejo. Orkovrita kupolo sin levadas **super** la tegmento. Sudety-montaro atingas eĉ 1400 metrojn **super** la marnivelo. La imiga uragano „Katrina” furiozis **super** Nov-Orleano.

B. La matena nebulo etendiĝas aŭtune **super** la kamparo. Belege aspektas sunsubiro **super** la maro. La flugŝipo rapide kuris **super** la ondoj. **Super** la urbo movis sin du ruĝaj helikopteroj. Nia balono senprobleme transflugis **super** tre alta montpinto. La ŝaŭmanta akvo transĵetiĝadis su-

per la ferdeko de nia ŝipo.

Mevoj flugantaj **super** la marbordo prognozias ĉiam pluvan veteron.

RIMARKO 1. En la frazoj sub la litero **B** oni ordinare ne uzas akuzativon, kvankam ĝi estas korekta ĉe translokiĝo: Ŝi kliniĝis **super** sian malŝan filinon. La fiŝoj elsaltis **super** la akvon. La suno leviĝis **super** la teron (al pozicio **super** la tero). Multaj kamparanoj en Pollando ne povas leviĝi nuntempe **super** sian stacion.

2. Pozicion de io aŭ iu, kies forto, grado aŭ rango estas pli alta; ekz.: Ne konvenas al sklavoj regi **super** princo. La bona Dio havas **super** la homoj senliman potencon. Dum la balotado poloj metis sian komunan celon **super** ĉiuj partiaj disputoj. La plej bona kandidato fariĝis prezidento **super** la tuta lando. Rapide disvastiĝas la usona monopolo **super** la mondmekato. La generalo estas **super** la kolonelo. Ĉi-somere la termometro montris eĉ 35 gradojn **super** la nulo. Elteni tion estis preskaŭ **super** homaj fortoj.

3. Stacion de iu, kies atento direktiĝas al la laboro; ekz.:

Ludoviko Zamenhof laboris energie **super** la projekto de lingvo internacia. Ĉiutage lia kapo estis klinita **super** diversaj libroj. Multaj zorgo laboras **super** Esperanto, por ĝin pli-

bonigi kaj perfektigi. Lernantoj ofte ŝvitas **super** la kompleksaj tempoj de la verbo. Mia amiko ofte cerbumas **super** la akuzativo. Mi neniam longe meditas **super** io.

RIMARKO 2. La prepozicio **super** povas stari eĉ antaŭ numeralo de subjekto; **ekz.:**

La 90an Universalan Kongreson de Esperanto ĉeestis **super** 2.400 gesamideanoj.

Oni ne povas konfuzi la prepozicion **super** (= pli alte ol) kun la adverbo **supre** (= ĉe la plej alta parto de io). Estas rimarkebla diferenco inter **super** *la domo* (pli alte ol la domo) kaj **supre de** *la domo* (en ĝia plej alta parto). En la lasta senco oni ankaŭ uzas **supre en** aŭ **en la supro de** (La falanta stelo rakontis al ni, ke **supre en** la ĉielo moviĝas vivo).

Vortfarado kun la prepozicio super:

- **supera** = havanta pli altan rangon, funkcion (Kolonelo estas **supera** al kapitano) aŭ havanta relative pli bonajn ecojn (farita el **supera** ledo, **supera** lernejo, merito)

aŭ tro animforta, por atenti, cedi ktp. (li estas **supera** al sia sorto, malfeliĉo).

- **superi** = esti supera al iu aŭ al io (Li **superas** min per sia alteco. Malbona virino diablon **superas**. La sukceso **superis** ŝian atendon).

- **supereco** = pliboneco en kvalito aŭ funkcio (La saĝeco havas **supereco** antaŭ la malsaĝeco. Ŝi ĉiam montras sian **supereco**, eble pro sia virina **superemo**).

- **malsupereco** = malpliboneco

en kvalito aŭ funkcio (Li sentis sian malsupereco),

- **superulo** = estro, ĉefo (Ne ĉiu **superulo** estas tamen meritplena fakulo),

La prepozicio **super** funkcias ankaŭ kiel prefiksoido, havante diversajn signifojn:

- **superstari** = havi sian supron super io (La urbeton **superstaras** mondo).

- **supersigno** = kromsigno super litero, **superpendi** = elstari, pendante super io, **superflugi** = flugi super io (Cikonioj aŭtune **superflugas** mian domon).

- **superforti**, **superbrili**, **superregi** = havi pli da povo, da potenco, da graveco, **superkrii** = krii pli laŭte ol aliaj (Instruisto provis **superkrii** gelernantojn).

- **supersaĝi** = venki per sia inteligenteco (Li **supersaĝas** siajn samaĝulojn).

- **superŝarĝi** = ŝarĝi trans la norma kapablo (Mi estas superŝarĝita per laboro).

- **supernutri** = doni pli ol la normalan kvanton da nutraĵo (supernutri infanon),

- **superverŝi** = inundi, superakvi (La rivero superverŝis multajn urbetojn).

- **superpagi**, **superflui** = esti tiel abunda, ke ĝi superfluas super la randojn,

- **superflua** = superanta la bezonon, superabunda,

- **supernatura**, **superbela**, **superhoma**, **supervesto**, **supertago**, **superjaro**,

Kiu kapablas interpreti?

Fojfoje eĉ esperantistoj bezonas interpretistojn, kapablajn labori profesive en budoj. Tio estas malfacila laboro: samtempe interpreti el Esperanto en la anglan kaj inverse, aŭ por aliaj lingvoj. Pro la nervostreĉa laboro profesiuloj alternas ĉiujn 20–33 minutojn...

La Nitobe–kolokvoj en Prago 1996, Berlino 1999 kaj pasintjare en Pekino bezonis tiajn spertulojn. Por tiaj kaj similaj aranĝoj kun kelkaj laborlingvoj, direktitaj al la neesperantista publiko, nur ege malfacile estis troveblaj laborpretaj homoj.

Nur esceptokaze je nia dispono estis profesiaj interpretistoj, ne por Esperanto, ili ne ekzistas. Ili tamen profesie interpretis por aliaj lingvoj kaj samtempe bone regas Esperanton. Ili konas la metion de interpretado kaj kapablas plenumi la atendojn. Bedaŭrinde



• **superruzi** = superi per ruzo, **superproduktado** = produktado supera al la aĉetkapablo de la konsumantoj.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio „super” el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:

*Sidi en laboroj ĝis super la oreloj.
Venkos ĉiam vero super mensogo.
De superfluo malboniĝas la ĝuo.
Spesmilo superflua poŝon ne ŝiras.
Ĉio supermezura estas terura.
Amo supermezura ne estas plezura.*

ekzistas grandaj miskomprenoj pri la temo, interalie laŭ jena skemo: Mi bone konas Esperanton, sekve mi kapablas traduki; mi kapablas traduki, sekve mi kapablas interpreti ktp. Tio nur malofte funkcias.

Kiel konate, ankaŭ bonaj konantoj de la lingvoj ne nepre kapablas bone traduki en sian gepatran lingvon aŭ el ĝi Esperanten. Oni ja devas konscii pri diversaj problemoj por tion bone fari. Kaj nur malmultaj bonaj tradukistoj aŭ regantoj de la lingvoj samtempe havas la lerton (kaj la nervojn) interpreti. Ekzistas kelkaj tiaj homoj, kiuj ja interpretis ekz. dum la Nitobe–simpozioj. Sed ankaŭ estas fakto, ke ne ĉiu el la volontuloj liveris akcepteblan rezulton.

Diversaj spertoj montris, ke estas urĝe necese sisteme serĉi talentulojn. Tio signifas, ke UEA (la Centra Oficejo) devus scii:

a) Kiu esperantisto estas profesia interpretisto, samtempe bona lingvospertulo kaj pretus se necese interpreti „siajn” lingvojn en Esperanton, respektive el ili en „siajn” lingvojn?

b) Kiu esperantisto, eĉ ne estante profesiulo, tamen disponas pri la necesaj kuraĝo, lerto kaj spertoj?

Estus tre dezirinde, se tiuj malmultaj profesiaj interpretistoj en niaj vicoj ne nur disponigus siajn spertojn kaj kapablojn por konkretaj aranĝoj, sed — eble en la kadro de trejnseminarioj — helpus trovi kaj kvalifiki taŭgajn personojn, kiuj fariĝus nia interpretista rezervo. Interesatoj pri la temoj plej bone sin direktu al la Centra Oficejo:

uea@inter.nl.net

Detlev Blanke
fonto: „Ret-Info

Plibonigu vian stilon

Tio estas rapida kaj sekura vojo al unueca lingvo.

1. La vera stilo Esperanta estas nur stilo simpla kaj logika. En la Lingvo Internacia oni devas obei sole nur la logikon (Zamenhofo Ludoviko Lazaro).

2. „Dank’ al” anstataŭ „danke al” estas evitenda.

3. La prepozicio ĉe la pasivo estas **de**.

Prepozicio **far** ne ekzistas en la lingvo.

4. ...la gramatika logiko pledas nekontesteble por kondicionalo post **kvazaŭ** (Varengjeno Gastono).

5. Esperantisto estas, kiu senrezerve agnoskas la deksexregulan Fundamentan regularon kiel bazon de logika gramatiko.

6. „Tiel/kiel” komparas manierojn de verbaj agoj;

„tiom/kiom” komparas gradojn de ecoj aŭ manieroj.

7. En artefarita lingvo, erara lingvouzo, kiom ajn disvastiginta ĝi estas, neniam povas esti ĝusta.

8. „-iĝ” signifas **nevole** transiri en la staton de radikoj.

9. Aplikante la sufikson „-iĝ”, oni unue certigu sin, ĉu ne estus pli konvene uzi refleksivon aŭ pasivon, kaj due, ĉu ĝi vere esprimas nevolan ŝanĝon en novan staton, ĉiam mem-

orante la Zamenhofajn ekzemplojn „paliĝi” kaj „ruĝiĝi” kaj (laŭ Zamenhofo mem!) malpli logikan, do evitendan „sidiĝi”.

10. La adverba participo ĉiam rilatas la subjekton de la dependiga prepozicio.

11. Estas esenca trajto de Esperanto, ke la radikoj restas senŝanĝaj. Kiel tio estas kutimo en la angla lingvo, oni devas skribi ne nur la proprajn nomojn kun majuskla inicialo, sed ankaŭ iliajn derivaĵojn.

12. Uzi la prepozicion „sen” kiel prefikson estas rekomendinde nur antaŭ substantivaj radikoj.

13. Infinitivo ne povas esti flanko elemento de kunmetita vorto.

14. En genitiva suplemento, kvalifika, neniam estas uzebla refleksivo (Mimoo Ludoviko).

15. Du rektaj komplementoj por sama verbo estas evitendaj.

16. En ĝuste kunmetitaj vortoj la flanko vorto estas laŭsence ligita al la precipa per subkomprenata prepozicio, kiu tamen ĉiam forestas, neniam per akuzativa **-n**.

17. Ĉiu verbo en subpropozicio havas la saman tempon aŭ modon, kiun ĝi havas, se ĝia propozicio fariĝus memstara (Varengjeno Gastono).

18. „Ties” rilatas al alia vorto ol al

„Ni venkos ondegajn“

artistoj apogas agadon de Caritas Polska kaj de Pola Televido TVP — Adoptado je distanco

En ĉiuj antenoj de TVP kaj en reĵo www.tvp.pl telespektantoj povas ekvidi kaj ekaŭdi la telediskon „Pokonamy fale“ (Ni venkos ondegajn) en plenumo de la plej grandaj steloj de la pola nuntempa estrado. La telediskon realigis TVP por la bo-

no de la programo „Adoptado je distanco“, dediĉita al geinfanoj — suferintoj de cunamo-katastrofo en Azio fine de decembro 2004.

La kanto estis skribita speciale por tiu agadkampo. La verkon skribis famkonataj polaj verkistoj — muzikon —

la subjekto de la antaŭa propozicio.

19. ...en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis...

(Zamenhofo Ludoviko Lazaro).

20. La flanka elemento de kunmetaĵo ne povas esti adjektivo.

21. La precipa vorto en duvorta kunmetaĵo staras je la fino, kaj ĝi povas esti substantivo, adjektivo, verbo kaj adverbo. La flanka elemento povas esti substantivo, sed ne adjektivo.

22. La Esperanta vortfarado ne permesas arbitran miksadon de iuj ajn vortspecoj.

23. En la vortoj kunmetitaj, pri kiuj estas parolate en la dekunua Fundamenta regulo, la flankaj vortoj povas esti nur substantivoj.

24. Kiam la precipa elemento de vortkunmetaĵo estas verbo, la flankelementa substantivo ne povas esti ties rekta komplemento.

25. La **vortoj kunmetitaj** estas formataj per simpla kunigo de la vor-

toj. La precipa vorto staras en la fino, kaj ĝi povas esti substantivo, adjektivo. aŭ verbo; la flanka vorto povas esti nur substantivo laŭsence enkondukita per propozicio. Tamen la propozicio ĉiam forestas (Mimoo Ludoviko).

26. Prepozitivo devas esprimi cirkonstancon de la ago de la subjekto mem, kaj ne de alia persono.

27. La adverbeco de prepozitivo estas en strikta rilato al la subjekto de la propozicio.

La prepozitiva adverbo kaj la verbo devas esprimi agon de la subjekto.

28. La **logiko kategorie** ordonas, ke por ĉiuj nomoj estu enkondukita unu egala ortografio (la simpla ortografio Esperanta — Zamenhofo Ludoviko Lazaro).

Ŝulco Rikardo: „Sur la vojoj de la Skolo Analiza“ (pp. 257 ĝis 259)

sendis: Danuta Kowalska

Romuald Lipko kaj vortojn — Jacek Cygan. Dum la surbendigado partoprenis la muzika ensemblo Budka Suflera kaj la surbendigon reĝisoris Grzegorz Sadurski ka produktinto la muzika eastas Mirosław Stępień. Inter la gekantistoj — plenumintajn tiun kanton estas konataj ne nur en Pollando: Felicjan Andrzejczak, Małgorzata Bednarz, Monika Brodka, Krzysztof Cugowski, fratoj Piotr kaj Wojtek Cugowscy, Ewelina Flinta, Artur Gadowski, Patrycja Gola, Anna Maria Jopek, Halina Jawor, Kayah, Paweł Kukiz, Krzegorz Markowski, Maryla Rodowicz, Irena Santor, Grzegorz Skawiński, Urszula, Zbigniew Wodecki.

La 6an de februaro 2005 sur la Teatralny-Placo en Varsovio estis aranĝita fare de TVP, Caritas Polska kaj ĉefurbo Warszawa la granda karitcela koncerto, dum kiu kantis ĉiuj supre menciitaj geartistoj kaj ankoraŭ multaj aliaj, entute kelkdekaj. Gvidis la koncerton preskaŭ 60 gesteloj — geparolistoj de la pola televido TVP.

„Adoptado je distanco” — estas longdaŭra programo de la helpo al INFANOJ — viktimoj dela CUNAMO-katastrofo en sud-orienta Azio. Helpe de tiu programo oni povas ĉirkaŭpreni zorgadon je unu infano, alpagante regule ekz. monatan konstantan monsumon . Por ke tio eki fari oni devas plenigi deklaron sur la paĝoj www.caritas.pl kaj sendi ĝin al: Caritas Polska Skwer Kardynała Stefana Wyszyńskiego 9, 01-015 Warszawa „Adoptado je distanco”

— signifas ankaŭ kolektadon de mono por la konstruado kaj enhavtenigo de infanhejmoj en landoj tuŝitaj per CUNAMO-kataklismo.

NI VENKOS ONDEGOJN

Muziko: Romuald Lipko
Pola teksto: Jacek Cygan

En paradizo vekigiĝis tago,
Homoj lazuron plektiĝis en harojn
Kaj senhejmaj hundoj
Fuĝis en arbarprofundojn
Ĉar ie
En dunkla abismo
Oni faris al maro jam vundojn
Kaj krio
De malbriditaj akvoj
Galopis jam al bordoj.

En paradizo vekigiĝis tago,
Ĉe ni ĵus naskiĝis Jesuo,
Kaj la festa nokto
Envolvadis nin per sonĝo
le en ni
Mallaŭtiĝis pastoraloj
Pri l' espero de ĉiuj homoj,
Kaj tie
Ondegoj vunditaj
Alvenadis jam al bordoj.

Vortoj vanaj estas
Dividu esperon vian
Kun tiuj, kiuj restis
TIE.

NI VENKOS ONDEGOJN
SE NUR ĈIU EL NI
KONSTRUOS LA BORDON
EL LA AM'.

Kiom vi povas doni?
Vi povas doni nur tion, kion vi estas mem.

Ekkonstruu en si bordon,
por ke dividi ĝin.
Do venu,
Malfermu sian koron
Jen vi ekparolos al silento
Al tiuj
Kiuj saviĝis
Kaj kiel ni estas marinfanoj.

Vortoj vanaj estas,
Dividu esperon vian
Kun tiuj, kiuj restis
TIE.

Nu kaj kio, vi satrigardis
Tion, kiel ondo portas morton?
Ĉiu estas fundo, ĉiu estas maro,
Helpu, vi povas, povas, povas.

NI VENKOS ONDEGOJN
SE NUR ĈIU EL NI
KONSTRUOS LA BORDON
EL LA AM'.

Traduko: Stanisław Śmigielski

Informe:

Laŭ interkonsento farita dum la ĉi-jara ARKONES, Eldonejo HEJME fariĝis peranto de la monata revuo de Litova Esperanto-Asocio, „Litova Stelo”. Samtempe la „Litova Stelo” fariĝas la peranto de „Pola Esperantisto” por Litovio kaj najbaraj landoj.

Esperanto en finna filmo!

Popolarmuziko de Vittula: Esperanto plenumas sian rolon — ankaŭ en la filmo!

En la libro Populdrmusik fren Vittula de Mika-el Niemi, en finna traduko Populddrimusiikkia Vittulajdnkdldtd, Niila, silenta knabo de la norda forgesita vilaĝo, subite ekparolas en Esperanto. La interpretistino de la fora afrika gasto subite malsaniĝas. En la preĝejo neniu scias aliajn lingvojn, sed fine la gasto provas per Esperanto. Tiam Niila sin anoncas. Li estas la savanto, same Esperanto. Tiu fascina libro vekis ne nur intereson pri la nordaj partoj de Svedio, kiuj nun pro la libro ricevas multajn vizitantojn, ĝi ankaŭ donis tuŝon de Esperanto al siaj multegaj legantoj.

Ĉiu leganto trovas en tiu libro aparte karajn erojn. Evidente la preĝeja sceno estas aparte signifa por la Esperanto-parolantoj. Kun scivolo mi iris rigardi la filmon. Ĉu kaj kiel Esperanto aperos? Rezultis nenia elreviĝo.

Esperanto ludas bele ĉarman rolon. Ni, Esperanto-parolantoj eĉ havas apartajn okazojn ridi. La situacio en kiu Niila lernas Esperanton estas pli klara en la filmo ol en la libro. „Kiel vi fartas?” demandas la radio.

La saman frazon Niila povas reuzi ankaŭ en la preĝejo.

Al la realigo de la Esperantlingvaj partoj kontribuis esperantistoj divers-

maniere. Interalie Leif Nordenstorm, redaktoro de „La Espero”, la organo de Sveda Esperanto–Federacio, rakontas ke li, dum la UK en Gotenburgo, pere de sia poŝtelefono helpis la aktorojn pri la elparolo!

Roland Lindblom en la informilo La Hirundo, novembro 2004, donis pliajn informojn:

„En junio iu telefonis al SEF kaj petis helpon. Ili bezonas virinan voĉon, belan. Mi tuj pensis pri Natalja Gerlach — konata kiel kantistino kun Ĵomart. Oni kontaktis ŝin kaj jam postan tagon ŝi vizitis la filmteamon.

En la filmo, kaj en la libro, oni ricevas klarigon kial la knabo Niila povas paroli Esperanton. Li sekvis radio–kurson, kaj en la filmo ni aŭdas la voĉon de Natalja.

Ĉe la fino de la filmo aperas amaso da nomoj, artistoj kaj helpantoj. Tie aperas nomo ankaŭ de alia esperantistino — Anna–Maria Lange el Lund. Ŝi jam frue havis kontakton kun la verkisto Niemi, kaj poste kun la filmteamo.

Ni esperantistoj povas ĝoji pro la mencio de Esperanto kaj ni eble povas atendi ke Mikael Niemi iom lernos la lingvon, almenaŭ iomete, ĉar li aĉetis lernolibron ĉe la Esperanta librostando en Bokmndssan en Gotenburgo”.

La filmo premieris en Pajala la 24an de septembro kaj en Finnlando la 8an de oktobro 2004. En Svedio ĝi allogis pli ol 300 000 personojn al kinejo, en Finnlando 100 000. La filmo estas ankaŭ luebla kaj aĉetebla kiel videofilm (VHS kaj DVD). La

filmo partoprenos en la Berlina filmfestivalo, 10–12 februaro, la konkurso kategorion junulara filmo.

En la angla ĝi ricevis la nomon Popular Music.

Anna Ritamdki

fonto: „Ret–Info”



Esperanto en la filmo „Blade: Trinity”!

Mi ĵus vidis la novan filmon „Blade: Trinity”, kaj estis E–o en la filmo!

En unu sceno, klare videblas reklamo kun la nomo „Esperanto” en grandaj literoj. En dua sceno, persono aĉetas ĵurnalon kaj parolas Esperante kun la posedanto de la kiosko.

En tria sceno, estas dulingva signo ĉe la enirejo de policejo, kun la vortoj „Police/Policejo” kaj „Protect and Serve/Protekti kaj Servi”. Kaj en kvara sceno, persono vundita batalante kontraŭ vampiroj konvaleskas en lito kaj rigardas la filmon „Incubus”!

Granda tago por Esperanto!

Ismael Ejarque Doménech

<ismaeelarque@yahoo.es>

Pasintĝaŭde en rusiaj kinejoj startis la usona filmo „Blade: Trinity” (rusa titolo — „Blej: Troica”). Laŭ anticipaj informoj ni scias, ke en la filmo estis uzita E–o — tie sonis dialogo kun kelkaj frazoj en E–o, estis ankaŭ ŝildo kun la E–subskribo (usonaj esperantistoj estis konsultitaj de la filmistoj pri skribo kaj prononco).

Jen la foto

Ok nejunaj homoj sidas ĉe la elegante kovrita tablo en la granda, eksklusiva restoracio ie en Italujo. Se iu volus pentri ĉi tiun manĝalonegon, tiu uzus diversajn nuancojn de la blua kaj neĝblanka farboj. Hazarde la homoj ĉe la tablo estas vestitaj ankaŭ per la same koloraj vestaĵoj. Tamen iliaj vizaĝoj signife varias; ili estas diverskoloraj, ĉar la posedantoj de ĉi tiuj vizaĝoj devenas de diversaj malproksimaj landoj. Ili estas esperantistoj el Eŭropo, Afriko kaj Sudameriko. Ligas ilin la esperantistino Anjo el Italujo, kaj Esperanto. La homoj estas gekorespondantoj de Anjo.

Anjo kreis ĉi tiun grupon organizante kaj pagante du semajnan restadon en Italujo por ĉiu el ili. Oni povas pensi, ke Anjo estas speciala persono, ĉar ŝi faras ion ravan, aŭ ke ŝi estas



Mi dimanĉe spektis la filmon. Bedaŭrinde la dialogo preskaŭ tute ne aŭdeblas, ĉar samtempe sonas ruslingva traduko de la frazoj. (En la originalo estis nur la E-lingvaj frazoj kaj anglaj surtekstoj). Tamen la ŝildo kun E-surskriboj „Policejo” kaj „Protekti kaj asisti” (apud la samaj anglalingvaj) bone videblas en centro de la ekrano dum 2–3 sekundoj.

Garik Kokolija

fonto: „Ret-Info”

riĉulino. Ŝi elspezas tiom multe da mono por la korespondamikoj.

Tamen ŝi aspektas kaj kondutas modeste, simple — eble nur iom mistere. Supozeble ŝi gajnis la monon per iu loterio. Ŝi estas malgranda, dika, korpulenta virino kun ronda vizaĝo en kiu nenio ŝajnas interesa. Malmulte ŝi parolas kaj malmulte ridetas. Dum la interparolo ŝi preferas uzi la francan lingvon ol Esperanton. Anjo konverŝacias france kun Brazilianoj kaj Afrikano.

Ŝi ofte ripetas:

— Mi estas laca. Mi estas malsana. Mi devas gluti medikamentojn por helpi al mi.

Eble pro tio oni povas klarigi certajn mankojn en ŝia konduto. Ŝi ne interesiĝas sufiĉe pri siaj gastoj, ne klarigas al ili la necesajn aferojn ligatajn kun ĉi tiu aranĝo.

La grupo nun atendas tagmanĝon kaj admiras la italan restoracion. Ili venis antaŭ kelkaj tagoj al Italujo kaj duono de ili estas ĉi tie la unuan fojon.

Kelnero venas kun antaŭmanĝo — iu speciala salato. Anjo tuj ĵetas sin al ĉi tiu specialaĵo. Tro rapide kaj tro volonte ŝi manĝas. Ĉiuj ŝajnas esti iom surprizitaj. Jeanne, Nederlandanino diras dignoplene:

— Bonan apetiton!

Tiam aliuloj ankaŭ komencas manĝi.

Anjo kaj apud ŝi sidantaj gebrzilanoj ekparolas france. Rolando — Afrikanano fiere partoprenas la konversacion. Maria — Ukrainianino estas malkontenta. Ŝi pensas: „Ĉu tiel devas aspekti la esperantista aranĝo? Laŭte ŝi diras:

— Mi ne konas la francan lingvon. Ni devas paroli en Esperanto. Ĉiuj ni estas esperantistoj kaj ni devas interkonatiĝi kaj kompreni nin reciproke.

Ĉiuj tuj silentas. La silento daŭras mallonge. Heda el Slovakujo ekkomencas:

— La salato estas tre bongusta.

Anjo levas la kalikon kun vino kaj proponas toston:

— Je via sano!

— Je via sano — ĉiuj ripetas.

Do iamaniere la konversacio en Esperanto komenciĝas. Pri kio? Pri manĝaĵo, ĉar ĝi estas en ĉi tiu momento aktuala. Ĉiuj ŝatas la italan manĝaĵon kaj laŭdas ĝin. Anjo estas kontenta. Rolando laŭdas la italan vinon. Anjo volonte aŭskultas lin. Ŝi mem naskiĝis en Afriko kaj tie pasis ŝia infaneco.

Rolando bone parolas Esperanton. Li direktas la konversacion al rakonto pri Afrikananoj, precize pri ilia malsato.

— Eŭropanoj ne imagas kiel la homoj vivas en Afriko. Ili malsatas kaj mortas sur stratoj.

Aperas la dua plado — viando kun terpomoj kaj legomoj.

La rakonto de Rolando pri malsatuloj malgrandigas nian apetiton. Rolando plu kontinuas:

— Afrikananoj ne povas helpi al si mem. Ili estas apatiaj. Eŭropanoj devas

helpi al Afrikananoj. Maria provas klarigi, ke Eŭropanoj el la ekskomunistaj landoj ne estas riĉuloj.

— Ni havas nur tiom por vivi modeste en niaj propraj landoj. Ronaldo ne estas konvinkita. Li ripetas:

— Eŭropanoj ne komprenas Afrikananojn. Ili tre volonte lernas Esperanton. Ili volas veturi al Eŭropo kaj ili esperas helpon de la eŭropaj esperantistoj. Maria pensas: „Ronaldo ne kredas, ke Eŭropano ne povas helpi, eĉ se li volas”. Ronaldo estas la interesa homo ne nur pro tio, ke li devenas el Afriko. La nigra, maldika, malgranda fumanto ŝatas altiri atenton. Li ne manĝas porkaĵon, ĉar li estas islamano. Kelkajn fojojn li ŝanĝis sian religion. Antaŭe li estis katoliko. Hejme li laboras kiel programisto dum tago. Nokte li okupiĝas pri Esperanto. Ĉe Ronaldo sidas Petro, la samlandano de Maria. Maria pensas: „Ĉu Petro estas kontraŭulo por Ronaldo?”

Li estas la alta, blonda viro. Petro sidas kun malfermita buŝo. Antaŭ li staras ankaŭ malfermita skatolo. Petro volas altiri la atenton de publiko, sed tio ne estas facila, ĉar li estas komekantano kaj surdulo.

Anjo demandas Petron:

— Pri kio vi tiom miras?

— Mi povas pentri tiujn murojn. Tio estas facila laboro. Li ripetas tion kelkfoje kaj montras sian skatolon, en kiu li havas specimenojn de diversaj farboj. Nun li estas senlaborulo en sia lando kaj imagas, ke iu el la esperantistoj en Italujo dungos lin kiel pentriston. Tiamaniere li perlaboros pli da mono ol en sia lando.

Anjo ridetas kaj demandas:

— Ĉu vi ŝatas restoracion?

— Mi ĉasas, mi ĉasas — Petro miskomprenas, ĉar malbone aŭdas. Jeanne diras:

— Mi malfrue eklernis Esperanton. Do mi ne povas kutimiĝi al esperantistoj. Ŝi tuj demandas Marian:

— Pro kio vi pli ofte ne parolas kun Petro? Li ja estas via samlandano. Vi certe neglektas lin. Maria malforte neas dirante:

— Heda el Slovakujo sufiĉe okupiĝas pri Petro.

Fakte, Heda ĉiam sidas ĉe Petro kaj ŝi laŭte parolas kun li. Heda estas la malgranda, dika blondulino. Tro laŭte kaj tro trudeme ŝi varbas homojn por Esperanto.

Maria fakte ne ŝatas Petron pro lia maldelikateco, pro lia volo tiri profiton per Esperanto.

Ronaldo demandas Marian:

— Pro kio vi kaj Petro estas tiom diferencaj, malgraŭ tio, ke vi estas el la sama lando?

Maria nenion respondas, sed pensas: „Povas tiel esti, tio dependas de la homaj eblecoj kaj ambicioj. Mi certe estas pli ambicia.

Anjo ree parolas france. Maria kritike diras al Jeanne:

— Anjo ne devas paroli france.

Jeanne reagas:

— Vi ne povas kritiki Anjon. Ŝi pagas ĉi tiun aranĝon. Ni estu kontentaj kaj dankemaj.

Surprizita Maria eksilentas kaj enpensiĝas. Ŝi plu meditas kaj fine konkludas:

— Oni povus organizi ĉi tiun ren-

kontiĝon pli efektive, kun plano. Tamen la homo neniam estas tute kontenta. Ĉi tiu renkontiĝo okazas danke al iu revo de Anjo, ŝia boneco. Ĝi estas valora donaco por ni malgraŭ kelkaj neperfektaĵoj. Anjo ofertas sin kaj sian monon tiel, kiel ŝi volas. Tiaj estas ŝia ebleco kaj ambicio. Oni devas akcepti la homojn tiajn, kiaj ili estas. Kompreneble oni devas akcepti la kondiĉojn, se ili estas honestaj. Oni ne povas postuli tro multe. Ĉiuj partoprenantoj de ĉi tiu renkontiĝo certe memoros ĝin kiel la bonŝancan, interesan eventon kaj ĉi tiuj rememoroj povos pozitive ekfrukti.

Funebre

Esperanto-movado en Poznań la 13an de majo adiaŭis Prezidanton de la Filio de Pola Esperanto-Asocio, sinjoron Jerzy Konieczny, kiu la 10an de majo subite mortis pro korinfarkto. Li estis 77-jaraĝa.

Sinjoro Jerzy kiel studento de arkitekturo en Gdańsk mem lernis la lingvon. Ekde 1985 jaro li estis membro de la Filio de PEA en Poznań kaj kelkfoje ĝia prezidanto.

Ni perdis tre fervoran esperantiston kaj bonkoran homon.

Halina Oleszek, Paweł Janowczyk

La 1an de aŭgusto 2005 en Zakopane forpasis mia Kara Edzino, Grandega amikino de Esperanto de jaro 1965.

Al ĉiuj esperantistoj, kiuj partoprenis la entombigan ceremonion, kaj esprimis diversmaniere al mi kondolencojn mi sincere dankas.

Eugeniusz Jania

Paŭlo kaj Gaŭlo

Vivis Paŭlo kaj Gaŭlo en dom' tiu sama:
Paŭlo — supre kaj Gaŭlo malsupre loĝadis...
Paŭl' neniun ofendis trankvila, pacama;
Plej sovaĝajn petolojn do Gaŭl' elpensadis.
En la ĉambro li ĉasis: jen hund', jen leporo;
Inter tabloj, tabletoj, li pelas kaj sonas
Kaj trumpetas kaj pafas; en ĉasa laboro,
Kriegante, slatante, laciĝon ne konas.
Paŭlo ĉion toleras; sed fine ne povas...
Iras suben al Gaŭlo, petegi lin provas:
„Kompatiĝu, sinjoro, kaj ĉasu pli mole,
Ĉar ĉe mi ĉiuj vitroj ekfalas senvole”.
Kaj Gaŭlo je ĉi tio:
„Libera hometo
En sia dometo”.
Kion je ĝi respondi?! Paŭl' ĉapelon prenis,
Eĉ vorton li ne pepis kaj hejmen revenis.
Morgaŭ Gaŭlo ankoraŭ bonguste ronkadas,
Jen nazon lian io de plafon' gutadas...
Li eksaltis el lito kaj supren rapidas.
Frap! Frap! — fermite!... Kio?!... Per tru' li ekvidas
Strangaĵon: tuta ĉambro estas akvoloko,
Kaj Paŭlo sur komodo sidas kun fiŝhoko.
„Sinjor', vi kion faras?!” — „Mi kaptas fiŝetojn!”
— „Sed, sinjor' mi sur kapo sentas la gutetojn!”
Kaj je tio ĉi Paŭlo:
„Libera hometo
En sia dometo”.

El fabl' morinstruon Vi legos facile:
„Vi — tiel al alia, li al Vi simile!”